


# LA JUNIA VIVO



## MONATA ORGANO DE „TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO”

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.  
 ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 1,50 NED. GULDENO AŬ EGALVALORO.

Por progresintoj.

### PARTOJ EL LETERO DE D-RO ZAMENHOF AL N. BOROVKO, PRI LA DEVENO DE ESPERANTO.

..... Vi demandas min, kiel aperis ĉe mi la ideo krei lingvon internacian kaj kia estis la historio de la lingvo Esperanto de l' momento de ĝia naskiĝo ĝis tiu ĉi tago? La tuta publika historio de la lingvo, t.e. komencante de la tago, kiam mi malkaŝe eliris kun ĝi, estas al vi pli-malpli konata; cetere ĉi tiun periodon de la lingvo estas nun, pro multaj kaŭzoj, ankoraŭ neoportune tuŝadi; mi rakontos al vi tial en ĝeneralaj trajtoj sole la historion de la naskiĝo de la lingvo.

Estos por mi malfacile rakonti al vi ĉion tion ĉi detale, ĉar multon mi mem jam forgesis. La ideo, al kies efektivigo mi dediĉis mian tutan vivon, aperis ĉe mi — estas ridinde ĝin diri — en la plej frua infaneco kaj de tiu ĉi tempo neniam min forlasadis; mi vivis kun ĝi kaj eĉ ne povas imagi min sen ĝi. Tiu ĉi cirkonstanco parte klarigos al vi, kial mi kun tiom da obstineco laboris super ĝi kaj kial mi, malgraŭ ĉiuj malfacilaĵoj kaj maldolĉaĵoj, ne forlasadis tiun ĉi ideon, kiel ĝin faris multaj aliaj, laborintaj sur la sama kampo.

Mi naskiĝis en Bjelostoko, gubernio de Grodno. Tiu ĉi loko de mia naskiĝo kaj de miaj infanaj jaroj donis la direkton al ĉiuj miaj estontaj celadoj. En Bjelostoko la loĝantaro konsistas el kvar diversaj elementoj: rusoj, poloj, germanoj kaj hebreoj; ĉiu

el tiuj ĉi elementoj parolas apartan lingvon kaj neamike rilatas la aliajn elementojn. En tia urbo pli ol ie la impresema naturo sentas la multepezan malfeliĉon de diverslingveco kaj konvinkiĝas ĉe ĉiu paŝo, ke la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj. Oni edukadis min kiel idealiston; oni min instruis, ke ĉiuj homoj estas fratoj, kaj dume sur la strato kaj sur la korto, ĉio ĉe ĉiu paŝo igis min senti, ke homoj ne ekzistas: ekzistas sole rusoj, poloj, germanoj, hebreoj ktp. Tio ĉi ĉiam forte turmentis mian infanan animon, kvankam multaj eble ridetos pri tiu ĉi „doloro pro la mondo” ĉe la infano. Ĉar al mi tiam ŝajnis ke la „grandaĝaj” posedas ian ĉiopovan fortunon, mi ripetadis al mi, ke kiam mi estos grandaĝa, mi nepre forigos ĉi tiun malbonon.

Iom post iom mi konvinkiĝis, kompreneble, ke ne ĉio fariĝas tiel facile, kiel ĝi prezentiĝas al la infano; unu post la alia mi forĵetadis diversajn infanajn utopiojn, kaj nur la revon pri unu homa lingvo mi neniam povis forĵeti. Malklare mi iel min tiris al ĝi, kvankam, kompreneble, sen iaj difinitaj planoj. Mi ne memoras kiam, sed en ĉia okazo sufiĉe frue, ĉe mi formiĝis la konscio, ke la sola lingvo internacia povas esti nur ia neŭtrala, apartenanta al neniu el la nun vivantaj nacioj. Kiam el la Bjelostoka reala lernejo (tiam ĝi estis ankoraŭ gimnazio) mi transiris en la Varsovia duan klasikan gimnazion, mi dum kelka tempo estis forlogata de la lingvoj antikvaj kaj revis pri tio, ke mi iam veturados en la ruta mondo kaj per flamaj paroloj inklindos la homojn revivigi unu el tiuj ĉi lingvoj por komuna uzado. Poste, mi ne memoras jam kiamaniere, mi venis al firma konvinko, ke tio ĉi estas nebla, kaj mi komencis malklare revii pri nova, arta lingvo. Mi ofte tiam komencadis iajn provojn, elpensadis riĉegajn deklinaciojn kaj konjugaciojn, ktp. Sed homa lingvo kun sia, kiel ŝajnis al mi, senfina amaso da gramatikaj formoj, kun siaj centoj da miloj da vortoj, per kiuj min timigis la dikaj vortaroj, ŝajnis al mi tiel artifika kaj kolosa maŝino, ke mi ne unufoje diradis al mi: „for la revojn! tiu ĉi laboro ne estas laŭ homaj fortoj”, — kaj tamen mi ĉiam revenadis al mia revo.

..... Unu fojon, kiam mi estis en la 6-a aŭ 7-a klaso de la gimnazio, mi okaze turnis la atenton al la surskribo „Svejcarskaja” (Drinkejo), kiun mi jam multajn fojojn vidis, kaj poste al la elpendaĵo „Konditorskaja” (Sukeraĵejo). Tiu ĉi „skaja” ekinteresis min kaj montris al mi, ke la sufiksoj donas la eblon el unu vorto

fari aliajn vortojn, kiujn oni ne devas aparte ellernadi. Tiu ĉi penso ekposedis min tute, kaj mi subite eksentis la teron sub la piedoj. Sur la terurajn grandegulajn vortarojn falis radio de lumo, kaj ili komencis rapide malgrandiĝadi antaŭ miaj okuloj.

En la jaro 1878 la lingvo estis jam pli-malpli preta, kvankam inter la tiam „lingvo universala” kaj la nuna Esperanto estis ankoraŭ granda diferenco. Mi komunikis pri ĝi al miaj kolegoj (mi estis tiam en la 8-a klaso de la gimnazio). La plimulto da ili estis forlogitaj de la ideo kaj de la frapinta ilin neordinara facileco de la lingvo, kaj komencis ĝin ellernadi. La 5-an de decembro 1878 ni ĉiuj kune solene festis la ekvivigon de la lingvo. Dum tiu ĉi festo estis paroloj en la nova lingvo, kaj ni entuziasme kantis la himnon, kies komencaj vortoj estis la sekvantaj: „Malamikete de las nacjes / Kadó, kadó, jam temp' está! / La tot' homoze in familje / Konunigare so debá. (En la nuna Esperanto tio ĉi signifas: „Malamikeco de la nacioj falu, falu, jam tempo estas! La tuta homaro en familion unuiĝi devas”). — Tiel finiĝis la unua periodo de la lingvo. Mi estis tiam ankoraŭ tro juna por eliri publike kun mia laboro, kaj mi decidis atendi ankoraŭ 5-6 jarojn kaj dum tiu ĉi tempo zorgeme elprovi la lingvon kaj plene prilabori ĝin praktike. Post duonjaro post la festo de la 5-a de decembro ni finis la gimnazian kurson kaj disiris. La estontaj apostoloj de la lingvo provis paroleti pri „nova lingvo” kaj, renkontinte la mokojn de homoj maturaj, ili tuj rapidis malkonfesi la lingvon, kaj mi restis tute sola. Antaŭvidante nur mokojn kaj persekutojn, mi decidis kaŝi antaŭ ĉiuj mian laboron. Dum 5½ jaroj de mia estado en la universitato, mi neniam parolis kun iu pri la afero. Tiu ĉi tempo estis por mi tre malfacila. La kaŝeco turmentis min; devigita zorgeme kaŝadi miajn pensojn kaj planojn, mi preskaŭ nenie estadis, en nenió partoprenadis, kaj la plej bela tempo de la vivo – la jaroj de studento – pasis por mi plej malgaje. Mi provis iafoje min distri en la societo, sed sentis min ia fremdulo kaj foriradis, kaj de tempo al tempo faciligadis mian koron per ia versaĵo en la lingvo prilaborata de mi. Unu el tiuj ĉi versaĵoj „Mia penso” mi metis poste en la unuan broŝuron eldonitan de mi; sed al la legantoj, kiuj ne sciis, en kiaj cirkonstancoj tiu ĉi versaĵo estis skribita, ĝi ŝajnis stranga kaj nekomprenebla.

En la jaro 1878 al mi ŝajnis, ke estas por la lingvo sufiĉe havi gramatikon kaj vortaron; la multpezecon kaj malgraciecon de la lingvo mi alskribadis nur al tio, ke mi ankoraŭ nesufiĉe bone

ĝin posedas; sed la praktiko ĉiam pli kaj pli konvinkadis min, ke la lingvo bezonas ankoraŭ ian nekapteblan ion, la kunligantan elementon, donantan al la lingvo vivon kaj difinitan, tute formitan spiriton. — Mi komencis tiam evitadi laŭvortajn tradukojn el tiu aŭ alia lingvo, kaj penis rekte pensi en la lingvo neŭtrala. Poste mi rimarkis, ke la lingvo en miaj manoj ĉesas jam esti senfundamenta ombro de tiu aŭ alia lingvo, kun kiu mi havas la aferon en tiu aŭ alia minuto, kaj ricevas sian propran spiriton, sian propran vivon, la propran difinitan kaj klare esprimitan fizionomion, nedependantan jam de iaj influoj. La parolo fluis jam mem, flekseble, gracie kaj tute libere, kiel la viva patra lingvo.

Ankoraŭ unu cirkonstanco igis min por longa tempo prokrasti mian publikan eliron kun la lingvo: dum longa tempo restis nesolvita unu problemo, kiu havas grandegan signifon por neŭtrala lingvo. Mi sciis, ke ĉiu diros al mi: „Via lingvo estos por mi utila nur tiam, kiam la tuta mondo ĝin akceptos; tial mi ne povas ĝin akcepti ĝis tiam, kiam ĝin akceptos la tuta mondo.” Sed ĉar la „mondo” ne estas ebla sen antaŭaj „unuoj”, la neŭtrala lingvo ne povis havi estontecon ĝis tiam, kiam ĝia utileco fariĝos por ĉiu aparta persono sendependa de tio, ĉu la lingvo jam estas akceptita de la mondo aŭ ne. Pri tiu ĉi problemo mi longe pensadis. Fine la tiel nomataj sekretaj alfabetoj, kiuj ne postulas, ke la mondo ilin antaŭe akceptu, kaj donas al tute nedediĉita adresato la eblon kompreni ĉion skribitan de vi, se vi nur transdonas al la adresato la ŝlosilon, — alkondukis min al la penso aranĝi ankaŭ la lingvon en la maniero de tia „ŝlosilo”, kiu, enhavanta en si ne sole la tutan vortaron, sed ankaŭ la tutan gramatikon en la formo de apartaj, tute memstaraj kaj alfabete ordigitaj elementoj, donus la eblon al la tute nedediĉita adresato de kia ajn nacio tuj kompreni vian leteron.

Mi finis la universitaton kaj komencis mian medicinan praktikon. Nun mi ekpensadis jam pri la publika eliro kun mia laboro. Mi pretigis la manuskripton de mia unua broŝuro” („D-ro Esperanto. Lingvo internacia, Antaŭparolo kaj plena lernolibro”) kaj komencis serĉadi eldonanton. Sed tie ĉi mi la unuan fojon renkontis la maldolĉan praktikon de la vivo, la financan demandon, kun kiu mi poste ankoraŭ ofte devis kaj devas batali. Dum du jaroj mi vane serĉis eldonanton. Kiam mi jam trovis unu, li dum duonjaro pretigis mian broŝuron por eldono kaj laste rifuzis. Fine, post longaj klopodoj, mi prosperis mem eldoni mian unuan broŝuron

en julio de la jaro 1887. Mi estis tre ekscitita antaŭ tio ĉi; mi sentis, ke mi staras antaŭ Rubikono kaj ke de la tago, kiam aperos mia broŝuro, mi ne havos plu la eblon reiri; mi sciis, kia sorto atendas kuraciston, kiu dependas de la publiko, se tiu ĉi publiko vidas en li fantaziulon, homon, kiu sin okupas je „flankaj aferoj”; mi sentis, ke mi metas sur la karton la tutan estontan trankvilecon kaj ekzistadon mian kaj de mia familio; sed mi ne povis forlasi la ideon, kiu eniris mian korpon kaj sangon, kaj ..... mi transiris Rubikonon.

Lazaro Ludoviko Zamenhof.  
(trad. el la rusa lingvo de V.G.)

### **Dank' al Esperanto.**

En la oktobra numero de „La Juna Vivo” mi legis la artikoleon „Dank' al Esperanto”.

Mi tamen terurigiĝis pro la fakto, ke Esperantisto povis esti helpanto de ekzekutista taĉmento. Kia kontrasto al la intenco de d-ro Zamenhof!

Junaj geamikoj bone komprenu, ke mondpaco ne venos per Esperanto. Ĝi nur povos veni se vi mem neniam estos preta helpi malfeliĉigi viajn proksimulojn kiel ajn. Se vi neniam helpos mortigi, sub kia ajn devizo. Tiam vi alproksimigos la celon de Esperanto. Nur tiam vi povos diri: „Dank' al Esperanto”.  
L. W.

### **Dolora rememoro.**

Antaŭ nelonge mi parolis kun instruisto, soldato de la ĉeĥoslovaka armeo, kiu dum longa tempo estis arestita en koncentrejoj. Mi demandis al li, kiu okazintaĵo postlasis en li la plej profundan efikon.

„Tion mi rakontos al vi,” li diris. „Mi vidis kruelegajn okazaĵojn, sed la plej dolora estis por mi la jena:

Ni estis translokigataj al alia koncentrejo. Ni marŝis, mortlacaj kaj soifegaj, tra urbo. Sur la trotuaro iris apud ni patrino kun sia, eble kvarjara, infano. Mi rememorigis pri mia fileto hejme, kaj mi ekridetis al la infano. Ĝi ekkoleriĝis, kaj mi aŭdis, ke ĝi demandas sian patrinon: „Patrino, ĉu mi rajtas piedbati lin?” „Jes, vi povas”, diris la patrino, „li ja estas nur militkaptito!” La infano alproksimiĝis, kaj piedbatis min ..... Tio estis mia plej malĝoja travivaĵo.....

Oni ja multe priskribis jam la kaŭzon de la dua mondmilito, sed la veran kialon mi ekkomprenis nur tiam, kiam mi travivis la menĉitan okazaĵon kun la infano. — Kiel la milito ja povus esti alia, kiam la homaro tute forgesis, ke ni ĉiuj estas homoj? Kiel

povus estiĝi harmonio inter la nacioj, se juna infano jam havas en sia koro edukitan malamon, kaj ne la veran amon? Tiam mi ekkomprenis, ke la estonta mondo fariĝos tia, kia estos la edukado de la junularo.

Laŭ „Esperantisto Slovaka”  
(El la libreto de d-ro Janček: Mondfrateco.)

### Ĝeneralaj sciigoj.

**La 32-a Universala Kongreso de Esperanto** okazos en Bern, de la 26a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 1947. — La kongreskotizoj estas fiksitaj jene: 25 svisaj frankoj ĝis la fino de la jaro, 30 sv.fr. ĝis la fino de marto kaj poste 35 sv.fr. Por edzinoj kaj junuloj estas malaltigitaj kotizoj. — La hotelprezoj en Bern varias inter 205—130 sv.fr. (por ok tagoj). Ĉar ne estos sufiĉe da hoteloj, granda parto de la partoprenontoj dormos en privataj loĝejoj, kaj amase en lernejoj kaj kazernoj. Ĉiukaze oni anoncu sin kiom eble plej baldaŭ! — En la komenco de novembro aperos la unua numero de la kongresa gazeto: „Svislando vokas vin”. Havigu ĝin al vi, skribante al: 32-a Universala Kongreso de Esperanto, Bundesgasse 20, Bern, Svisujo.

**La 20-a kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda** okazos en Aarhus, Danujo, 2-7 aŭgusto '47. — La kongreskotizo estos 13 dan.kr. por SAT-anoj, kaj 16 dan.kr. por ne-SAT-anoj. Por fru-aligintoj la kotizoj estos 10 kaj 13 d.kr. — Kunveno estos „Folkets Hus” (Popola Domo). Monon oni sendu al la kasisto: Holger Hansen, Haslevej 13. Aabyhoj, Danujo, aŭ al la landaj perantoj.

### T.J.O.-RUBRIKO.

(Sokr. F. Meydam, Owenstr. 59, Leerdam, Ned).

En la antaŭa numero ni sciigis, ke aperos aparta TJO-bulteno. Ĉar pro diversaj kaŭzoj ne eblis presigi ĝin aparte, tiu bulteno nun aperas en „La Juna Vivo”. Pro tio la novembra numero estas 24-paĝa.

**El la sveda sekcio.** La sveda sekcio de TJO aliĝis al la Sveda Esperanto-Federacio kiel faka organizo. La junularsekcio restos memstara, sed intime kunlaboros kun SEF. Oni jam komencis intertrakti rilate al junular-interŝanĝoj, kiuj okazos venontsomere. Espereble la junaj esperantistoj en 1948 jam estos tiom multnombraj kaj fortaj, ke ili povos aranĝi internacian TJO-kunvenon!

La junularsekcio nun havas propran rubrikon en la organo de SEF. Gejunuloj, sendu artikolojn por tiu rubriko al la sveda TJO-peranto!

**La Internacia Kunveno en Ipswich.** Bedaŭrinde ni ankoraŭ ne povas doni detalajn sciigojn. Tamen laŭ letero de s-ro Heath montriĝas, ke oni entuziasme laboras! Oni jam interrilatas kun la Ministerio por Edukado, por ke la stabo, kiu pretigas la malkarajn manĝaĵojn por la lernoj-infanoj, ankaŭ prizorgu la manĝaĵojn dum la TJO-kunveno. — En la apudeco estas belegaj domegoj, kaj se la registaro ne permesos uzi tiujn, ni certé rajtos uzi la lernejojn. La restadkostoĵoj do fariĝos minimumaj! Kaj ankaŭ la marvojaĝo jam fariĝis malpli multekosta! Do — anoncu vin baldaŭ!!!

La geamikoj en Ipswich streĉe laboras! Ni iru grandnombre al ili!



# ĜENERALA BULTENO DE TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO

fondita la 16an de Aŭg. 1938 en Groet, Nederlando

Sekretario: F. Meydam, Owens-  
straat 59, Leerdam.

Kasisto: M. v. d. Horst, Johan  
Idastraat 32, Rotterdam, Poŝt-  
ĝiro No. 330139.

Organo: „La Juna Vivo”, redak-  
torino: N. Kool, West-Grafdijk.

Filmservo: H. J. Schut, Midden-  
weg D 89, Heerhugowaard.

---

OKTOBRO 1946.

---

Ni prezentas al niaj membroj ĉi tiun Bultenon kun balotilo por ke ili povu partopreni en la Referendumo laŭ decido de la T.J.O.-Konferenco en Blankenberge, Belgujo, en Aŭg. 1946. Bonvolu atenti, ke ankoraŭ validas la originala statuto de 1938 laŭ kiu ĉiu membro havas voĉdonrajton. Sendu la balotilon en fermita koverto al la sekr. F. Meydam, Owensstraat 59, Leerdam. Sur la koverto skribu: REFERENDUMO: *Ne* aldonu leterojn pri aliaj temoj, ĉar la leteroj kun la balotiloj estos malfermataj nur en Januaro 1947.

PROJEKTO DE LA REGULARO DE TUTMONDA JUNULAR-ORGANIZO laŭ la originala statuto kaj proponitaj aldonoj kaj ŝanĝoj.

1. *Nomo.* La nomo de la organizo estas Tutmonda Junular-Organizo. (T.J.O.).

2. *Celo.* T.J.O. celas:

a. Konsciiĝi la junularon pri tutmonda interfrateco kaj akceli ĝin pere de:

1. Propagandado de la lingvo Esperanto inter la junularo de la tuta mondo.

2. Aranĝado de internaciaj renkontiĝoj.

3. Legado de komuna gazeto.

4. Korespondado en Esperanto.

5. Ĉiuj indaj rimedoj por interfratigi homojn de diversaj nacioj, religioj, rasoj kaj politikaj konceptoj.

b. Akceli, ke Esperanto estu akceptata en la lernejoj.

3. *Karaktero.* T.J.O. estas supertendenca rilate al la sub 2a5 nomitaj diferencoj.

4. *Membreco.* T.J.O. havas jenajn kategoriojn de membroj:
- Membroj aktivaj* (personoj de 16 ĝis 25 jaroj laŭ la belga propono, personoj de 16 ĝis 30 jaroj laŭ la franca propono, aŭ personoj de 14 ĝis 25 jaroj laŭ la propono de la estraro.)
  - Membroj subtenantaj* (personoj havantaj pli ol 25 (30) jarojn.
  - Membroj aspirantaj* (infanoj havantaj malpli ol 14 (16) jarojn).
  - Membroj simpatiantaj.*

*Membro aspiranta, Membro aktiva kaj Membro subtenanta* povas esti esperantist(ino) aŭ lernanto de Esperanto, konsentanta pri la celo de T.J.O.

*Membro simpatianta* povas esti ĉiu, kiu konsentas pri la celo de T.J.O.

Personoj, kiuj estas elektitaj por iu funkcio estas rigardataj kiel aktivaj membroj.

5. *Sekcioj, Grupoj, Fakoj.* Individuaj membroj povas agadi kolektive, se la funkciado de la organizo sur iu landa aŭ faka tereno igas tion dezirinda. Por ĉiu sekcio, grupo, kaj fako validas sensanĝe la ĝenerala regularo. Ili ne havas apartajn estrarojn, sed formas laŭbezzone plenumajn komitatojn.

6. *Oficoj.* T.J.O. havas:

estraron, konsilantaron, ĉefperantojn, perantojn, funkciulojn por specialaj servoj.

Ĉiu ofico daŭras du jarojn; oni povas reelekti ĉiujn.

*La estraro* estas elektata de ĝenerala membrokunveno aŭ per ĝenerala referendumo. Ĝi konsistas el maksimume 9 personoj, nome: prezidanto, sekretario, vic-sekretario, kasisto, redaktoro kaj 4 asesoroj, kiuj loĝu en sama lando aŭ najbaraj landoj. La prez., la kasisto, la vic-sekretario kaj du asesoroj eksiĝas je la parnombraj jaroj. La sekretario, la redaktoro kaj la du aliaj asesoroj eksiĝas je la neparnombraj jaroj. Se iu estrarano eksiĝas, la ceteraj rajtas elekti anstataŭanton, kiu funkcios ĝis la plej proksima ĝenerala kunveno aŭ referendumo.

*La Konsilantaro* konsistas el la ĉefperantoj kaj havas la taskon, konsili la estraron.

*Ĉefperantoj:* en ĉiu lando T.J.O. havu ĉefperanton, kiu plenumas la organiza taskon en la koncerna lando. Li estas elektata de la membroj de la lando kun posta aprobo de la estraro. Se necesas, la estraro elektas la ĉefperanton. En landoj, kie estas pli ol 50 membroj, oni elektas almenaŭ 4 personojn, kiuj formas kun la



ĉefperanto la Laborkomitaton. Ĉiu komitatano havas parton de la ĉefperanta tasko sub prezido de la ĉefperanto.

*Perantoj:* en ĉiu loko aŭ regiono T.J.O. havu peranton. Ili estas elektataj de la membroj en la koncerna loko aŭ regiono kun posta aprobo de la ĉefperanto. Se necese la ĉefperanto elektas peranton.

*Funkciuloj:* La elekto de funkciuloj por specialaj servoj dependas de la karaktero de la funkcio, kaj okazas kiel la elekto de estraro, ĉefperanto aŭ peranto.

7. *Aliaj organizoj.* Ĉiu esperantista asocio, kiu konsentas pri la celo de T.J.O. povas aliĝi kiel „*subtenanta organizo*”.

Ĉiu ne-esperantista asocio povas aliĝi samkondiĉe kiel „*simpatianta organizo*”.

8. *Administra jaro.* La administra jaro daŭras de 1 Julio—30 Junio.

9. *Balotado, Referendumo.* Nur aktivaj individuaj membroj havas voĉon en balotado. Referendumo okazas laŭbezzone laŭ decido de la estraro.

10. *Propozoj.* Ĉiu membro povas fari proponojn en la intereso de T.J.O.

11. *Kunvenoj.* Ĉiujare okazu internacia junularkunveno, kiu havu festan kaj propagandan karakteron. Dum tiu kunveno okazu laborkunsido („ĝenerala membrokunveno”) por solvi organizajn demandojn. Se en tiu laborkunsido malpli ol  $\frac{2}{3}$  de la membraro estas iel reprezentata, la estraro deklaras ĝin nedecidorajta kaj okazigas referendumon. Por ĉiu internacia kunveno aparte la estraro decidu, kiuj kategorioj de membroj partoprenos. Landaj aŭ regionaj kunvenoj okazas laŭ decido de ĉefperanto, peranto aŭ organizantoj. Ĉefperantoj ktp. decidu pri la kategorioj de partoprenantoj.

12. *Aliĝo kaj eksigo.* Oni povas aliĝi je ĉiu dato kaj pagasian kotizon ĉe la aliĝo, sed almenaŭ por la tempo laŭ jena tabelo:

1 Jan.—30 Junio; 1 Febr.—31 Dec.; 1 Marto—31 Dec.; 1 Aprilo—31 Dec.; 1 Majo—31 Dec.; 1 Julio—31 Dec.; 1 Aŭg.—30 Junio; 1 Sept.—30 Junio; 1 Okt.—30 Junio; 1 Nov.—30 Junio; 1 Dec.—30 Junio.

Oni ne povas aliĝi sen abono al la oficiala TJO-Organon.

13. *Kotizo.* Ĉe apero de ĉi tiu regularo la kotizoj estas:

a. membroj aktivaj: hgld. 2,50 jare; b. membroj-subtenantoj: hgld. 2,50; c. membroj-aspirantoj: hgld. 2.—; d. membroj-simpatiantoj: hgld. 1.—; e. subtenantaj organizoj: hgld. 10.—; f. sim-

patientaj organizoj: hgld. 10.—; — La kotizoj estas destinitaj: a, b, c: 1. por la abono al la TJO-organo hgld. 1,50; 2. 50 % de la cetero por la ĝenerala kaso; 3. 50 % por la landa kaso aŭ landa propaganda. —

d. por la landa kaso aŭ landa propaganda. — e kaj f: de internaciaj organizoj por la ĝenerala kaso; de landaj organizoj por la landa kaso aŭ landa propagando.

14. *Kontrolo.* La ĝenerala membrokunveno elektas komitaton, kiu kontrolas la havaĵojn de TJO. La landa membrokunveno elektas komitaton, kiu kontrolas la havaĵojn de la landa laborkomitato, aŭ de la ĉefperanto.

15. *Organo:* La oficiala TJO-organo estas „La Juna Vivo”. Ĝia celo estas simila al paragrafo 2a. Krome ĝi enhavas la plej necesajn organizajn komunikojn.

### **Raporto pri la Laborkunsido je la 4a de aŭg. 1946a dum la TJO-Konferenco en Blankenberge.**

Ĉeestis 27 TJO-anoj kaj, kiel gastoj, kelkaj membroj de Belgaj Esp. organizoj. Prezidanto estis Job Kars, Nederlando.

Ĉar la konferenco nur havis la rajton diskuti pri la diversaj proponoj ni enpresigas la rezulton de la preparoloj en LJV por ke la membroj de TJO povu voĉdoni per referendumo.

#### *1. Pri la estraro.*

Propono la (vidu LJV No. 103—104, paĝo 23). Dum la jaro 1946—'47 funkciu estraro konsistanta el 7 personoj laŭ ĉi-suba listo:

P. Krijt, Amsterdam, prezidanto; Floor Meydam, Leerdam, sekretario; Mary Krijt, Amsterdam, vic-sekr.; M. v. d. Horst, Rotterdam, kasisto; Nelly Kool, West-Graafdiijk, redaktorino; H. J. Schut, Heerhugowaard, filmservo; W. Bant, Groet, ĝeneralaj aferoj.

La konferenco unuanime rekomendas akcepti la proponojn pri la estraro kaj la

#### *2. konsilantaro.*

Ĝi konsistu do el la diverslandaj ĉpj. Ĝi nur povos konsili al la estraro en okazoj kiam la estraro devas fari gravajn decidojn, kiuj ne permesas prokraston ĝis membrokunveno aŭ referendumo.

#### *3. Regularo:*

la konferenco trovas dezirinde, aldoni ĉi suprajn proponojn al la statuto.

4. *Referendumo*, vidu supre.

5. *Aliĝo de TJO al IEL*, propono de la Belga kaj Sveda sekcioj. La starpunkto de la Belga sekcio estas, ke IEL estas la plej granda int. Esp. org. kaj ke la profitoj per la aliĝo estas diversaj, i.a. la nomo de nia movado estos menciata en la jarlibro de IEL, TJO-anoj povos esti IEL-delegitoj, cetere ni devas formi fortan unuecon. Nia sveda ĉp. diris ke en Svedujo oni nur tiam volos subteni TJO-on, kiam nia organizo estos faka aŭ kunlaboranta organizo de IEL.

Oni voĉdonis pri la ĉi-supra propono kun jena rezulto: 22 voĉoj por aliĝo al IEL; 2 voĉoj kontraŭ; 3 sindetenoj.

La starpunkto de la estraro estas, ke la profito de la aliĝo al IEL por TJO estas tre malgranda. La nuna financa stato de TJO ne permesas pluajn elspezojn. Aliflanke oni povas demandi: kial ne aliĝi al SAT aŭ IKUE? Vere, IEL estas neŭtrala, sed ankaŭ UEA estas tia kaj la lastnomita estas la unua neŭtrala int. Esp. org. Kaj ni devas konsideri, ke en TJO troviĝas katolikaj, kristanaj, komunistaj ktp. anoj, kiuj certe ne aliĝus al IEL, dum ekzistas la katolika, kristana, kaj ruĝa int. Esp. org. (Vidu la artikolon de F. Meydam en LJV).

6. *Pri la aĝolimo*.

La Belga propono:

la kerno de TJO konsistu el aktivaj membroj 16—25 jaraj; la malpliagaj estu membroj aspirantaj, 12—16 jaraj; personoj pliaĝaj estu membroj subtenantaj, kondiĉe ke ili ankaŭ estu membroj de iu alia Esp. org. por plenkreskuloj, nacia aŭ internacia. Nur la aktivaj membroj 16—25 jaraj estu voĉdonrajtaj. La membroj subtenantaj, kiuj plenumas iun ajn funkcion en TJO (peranto, ĉefperanto, kursgvidanto, estrarano ktp.) ankaŭ havu la voĉdonrajton, sed nur kiam la aktivaj membroj konsentas pri tio.

La ned. reprezentantoj konsentas pri la belga propono. Ankaŭ la sveda ĉp.

*La franca propono*: tute egala al la belga, oni nur fiksas la aĝolimon je la 30a jaro. Klarigoj:

al la belga propono:

TJO estis, estas kaj devas resti JUNULAR-organizo; ĝia tasko do nur estas, resti trairejo en kiu ni edukas la junajn Esperantistojn kun la celo, ke ili kiam ili estos 25 jaraj, mem elektu sian Esp. organizon por plenkreskuloj.

al la *franca* propono:

oni fiksi la aĝolimon je la 30a jaro, same kiel en la junulargastejoj. La anglaj reprezentantoj samopinias kun la francaj.

Opinio de la konferenco: 13 voĉoj por la belga propono; 11 voĉoj kontraŭ; 3 sindetenoj.

La vidpunkto de la estrar-reprezentanto:

oni nepre evitu ĉian devigon en TJO, do ne diru, ke la membroj-subtenantoj samtempe devas esti anoj de alia organizo. (Kvankam preskaŭ ĉiu TJO-ano jam estas ano de alia org. oni tamen ne metu tion en la statutojn).

La belgoj kaj svedoj diras, ke per tio oni nepre havos la subtenon de la fortaj Esp. organizoj, kiuj vidos tiam en TJO fonton de junaj kaj ofte bonaj novaj membroj.

7. Propono de S-ro. Heath, Britujo.

Aliĝo de TJO al la Monda Federacio de Demokrataj Gejunuloj.

La plej granda parto de la kunveno neniam ankoraŭ aŭdis pri tiu organizo. F-ino. Rees (Britujo) klarigis al ni, ke tiu organizo nur estas demokrata kaj precipe kontraŭfaŝisma.

La starpunkto de la estrarano estas, ke ni evitu ĉian politikon en la movado. Krom tio oni devas konsideri la finanĉan flankon de la afero. (vidu la aliĝon al IEL).

La konferenco trovas dezirinde unue presigi en LJV klarigojn pri la nomita Monda Federacio.

8. La venonta Internacia Kunveno.

La franca ĉp-ino. opiniis, ke ni nepre devas okazigi la TJO-kunvenon en la sama loko, kie okazos la Universala Kongreso, por eviti grandajn vojaĝkostojn; ekzemple en Svisujo.

La angla ĉp-ino. diris, ke por la angloj tio estos tre malfacila. Kiam oni venos kun la infangrupoj, oni devos prizorgi ilin dum la tuta tempo, do ankaŭ dum la daŭro de la Kongreso. Ni krome atentu la eksterordinare grandajn vojaĝkostojn.

Estas pli bone organizi la sekvontan kunvenon en Anglujo, kiel jam delonge estas la deziro de niaj anglaj amikoj. S-ro Heath interrilatos kun la junulargastejoj en Anglujo, al kiuj li bone rilatas.

La sveda ĉp. invitis nin por la jaro 1947 aŭ 1948 al Malmö.

### **Opinioj pri la aĝolimo kaj aliĝo de TJO al IEL.**

*La starpunkto de la belga sekcio pri la aĝolimo.*

La punkton „Membraro” en la ĝeneralaj statutoj de T.J.O., ni volas ŝanĝi jene:

A. **AKTIVAJ MEMBROJ:** rajtas ĉeesti la T.J.O.-kunvenojn.

1. *Malpli ol 16 jaroj:* tiu kategorio ne havas voĉdonrajton.

Lernanta aŭ scianta Esperanton kaj konsentanta pri la celo de T.J.O.

2. *De 16 ĝis 25 jaroj*: tiu kategorio havas voĉdonrajton. Scianta Esperanton kaj konsentanta pri la celo de T.J.O. Tiu kategorio elektas: la grupgvidantojn, la geperantojn, laborkomitatanojn, geĉefperantojn kaj estraranojn.
3. *La grupgvidantoj, geperantoj, laborkomitatanoj, geĉefperantoj kaj estraranoj*: tiu kategorio estas elektata de la kategorio 2. Ne gravas se la membroj de tiu ĉi kategorio havas pli ol 25 jarojn. Tiu kategorio havas voĉdonrajton. Scianta Esperanton kaj konsentanta pri la celo de T.J.O.

B. SIMPATIANTAJ MEMBROJ: ne rajtas ĉeesti la T.J.O.-kunvenojn.

1. *Neesperantistoj*: la kotizoj de tiu kategorio restas al la landa sekcio.
2. *Esperantistoj plenaĝaj*: tiu kategorio ne havas voĉdonrajton. Ili nur rajtas sendi konsilojn en la intereso de T.J.O. al la landa ĉefperant(in)o, kiu, se la propono ne estas solvebla en la kadro de la landa sekcio, transdonas ĝin al la T.J.O.-estraro.

*Rimarko*: La membroj, kiuj iĝas 25-jaraj kaj kiuj ne apartenas al la kategorio 3 de la aktiva membraro, devas forlasi T.J.O. kiel aktivaj membroj. Ili mem elektas la plenkreskulan Esperanto-organizon al kiu ili aliĝos. Ili kompreneble povas subteni T.J.O. kiel simpatiantaj membroj.

por la Belga Sekcio, Carlos Braet.

*La starpunkto de la Belga Sekcio pri la aliĝo al I.E.L.*

I.E.L. estas la plej granda kaj la plej forta Esperanto-movado en la tuta mondo. Ĝi estas la *centro* de la Esperanto-movado.

Same kiel ekz. la katolikoj havas por sia religio centron en Romo (la eklezio), same ĉiuj, kiuj uzas Esperanton havas sian centron en I.E.L.

*Rimarko*: Oni ne diskutu pri la afero U.E.A.—I.E.L., ĉar la kunfandiĝo certe okazos ne pli malfrue ol okaze de la U.K. en Svisujo venontjare. Cetere, ĉiuj esperantistoj, kiuj bone konas la iaman aferon U.E.A.—I.E.L., ne hezitas elekti I.E.L. kiel la plej taŭgan centran Esperanto-movadon (Mi al ĉiuj, kiuj deziras, volas eksplicite la iaman aferon U.E.A.—I.E.L., kun veraj ciferoj, datoj kaj faktoj).

Se T.J.O. ne estus *neŭtrala* (en la senco, ke ĉiuj opinioj trovas lokon en ĝi), tiam ĝi aliĝu al la plenkreskula organizo, kiu havas la saman tendencon kiel T.J.O.

Sed T.J.O. estas *neŭtrala*; kaj tial logike ĝi aliĝu al neŭtrala plenkreskula organizo.

La argumento de la TJO-estraro, kiu diras, ke la TJO-anoj ne ŝatas la aliĝon al I.E.L. ne taŭgas. Efektive, se la diversopiniantaj T.J.O.-anoj akceptas vivi en T.J.O., ili certe ne malŝatas ke T.J.O. aliĝu al I.E.L., kiu havas la saman neŭtralecon kiel T.J.O. Kaj cetere, ĉiuj organizoj, ĉu *peresperantaj*, ĉu *poresperantaj* havas la moralan devon aliĝi al la *Centro* de la Esperanto-movado, kiu estas I.E.L. Unueco estas forto! Ni venkos unuiĝintaj!

La avantaĝoj por T.J.O., se ĝi aliĝas al I.E.L., estas:

1. En la jarlibro de I.E.L. aperos ĉiuj sciigoj rilate al T.J.O., kiel: celo, statutoj, kotizoj, adresoj de la estraranoj, ĉefperantoj, ktp.
2. En „*Esperanto Internacia*”, kiu aperas monate kun abonkvanto de 3800 ekz., T.J.O. povos laŭpove aperigi sciigojn, novaĵojn, raportojn pri T.J.O.
3. Ĉiuj T.J.O. membroj estos asociaj membroj de I.E.L. kaj rajtos uzi la servojn de la I.E.L. delegitaro.
4. La T.J.O. membroj, individuaj membroj de I.E.L., povos esti I.E.L.-delegitoj.

La T.J.O. konferenco en Blankenberge klare esprimis la deziron ke T.J.O. aliĝu al I.E.L.: de la 27 TJO-anoj, kiuj ĉeestis la labor-kunsidon, 22 anoj voĉdonis por la aliĝo al I.E.L., 2 anoj voĉdonis kontraŭ, kaj 3 anoj sindetenis.

Al la tutmonda membraro de T.J.O. nun sekvi tiun vojon, tiel klare montritan! En la granda intereso de T.J.O.: aliĝo al I.E.L.!

Ni ne hezitu, ĉar prokrasto estas perdo!

por la Belga Sekcio, Carlos Braet.

La sveda sekcio subtenas la proponon pri aliĝo al I.E.L.

*El letero de Alberto Pedro da Silva, Lisbono, Portugalio:*

Profitante la okazon mi sciigas vin, ke kelkaj ĉi tieaj s-anoj plendas pro la I.E.L.-emo de T.J.O. Mi persone opinias, ke vi ne devas paroli pri alia organizaĵo krom la nia, ĉar I.E.L. ne estas la sola, kiu indas tiun sindonemon. Estas pluraj kiel U.E.A., S.A.T., ktp., kiuj ludas gravan rolon en la esperanta movado kaj jam havas junulan frakcion .....

*Opinio de la estraro de T.J.O.*

Principe ni havas nenion kontraŭ I.E.L. Kontraŭe, ni alte respek-

tas la por- kaj peresperantan laboron de tiu organizo. Sed tio tute ne signifas, ke ni ne alte taksas la laboron de multaj aliaj organizoj. En ĉi tiu Bulteno vi legos informon de Nelly Rees pri la Mondfederacio de Demokrata Junularo. Certe ties agadoj laŭ tiu informo meritas ĉies subtenon. Kaj tre konsekvence Fraŭlino Rees finas sian leteron per la vortoj: El la supre-cititaj punktoj sekvas klare, ke T.J.O. devus havi lokon en ĉi tiu Federacio, kies celojn kaj proponitajn aktivaĵojn ni jam praktikas. Se ni aniĝos ni rajtos meti antaŭ la Federacion la celojn kaj pretendojn de Esperanto.”

La estraro de T.J.O. opinias, ke estas neeble aliĝi al ĉiuj organizoj, kiuj fakte meritas nian subtenon. Unue nia financa stato tute ne permesas tion kaj due tia agado signifus la morton de T.J.O., ĉar la membroj daŭre disputadus pri la meritoj aŭ malmeritoj de la koncernaj organizoj. Se estas en la mondo organizoj, kiujn vi volas subteni, faru tion, sed lasu T.J.O.-n libera kaj netuŝita. Nia organizo vivu laŭ sia propra ekzistado. Nur tiam ĝi povos plenumi sian taskon, tiel klare esprimitan en la paragrafo 2a de nia Regularo: T.J.O. celas: Konsciigi la junularon pri tutmonda interfrateco.

P. Krijt, prez.

### **Mondfederacio de demokrata Junularo.**

Dum la TJO-Konferenco en Blankenberge oni proponis aliĝi TJO al la supremenciita organizo. Kia do ĝi estas?

Reprezentantoj de junularmovadoj el multaj landoj kunvenis en Londono dum Novembro 1945 por starigi Federacion. Ili unuiĝis en la decido laboregi por Paco, Libereco kaj Egaleco en ĉiu mondparto. La Federacio opinias, ke ĝia laboro estos kontribuo al la laboro de UNO (Organizo de la Unuiĝintaj Nacioj) kaj la plej forta rimedo certigi la protekton de la rajtoj kaj celoj de la junularo, kaj la feliĉecon kaj bonstaton de la estontaj generacioj.

Inter la celoj de la Federacio troviĝas jenaj:

Klopodi al internacia interkompreno kaj kunlaborado en ĉiuj fakoj (ekonomia, instrua, kultura, ktp); kontribui kiom eble plej multe al la forigo de faŝismo; helpi al la registaroj certigi pacon kaj sekurecon kaj eduki la junularon en la spirito de demokratio. Altigi la vivnivelon de la junularo; helpi al la forigo de limoj rilate al sekso, instruado, loĝejo, religio, raso; laŭpove instrui al la junularo la ideojn kaj respondecojn de mondcivitaneco.

Inter la aktivaĵoj troviĝas jenaj: Starigi informan servon por

helpi al kontakto inter junularmovadoj en ĉiuj landoj. — Aranĝi internaciajn konferencojn por pridiskuti la problemojn de la junularo. Provizi korespondcentron por la mondjunularo. Organizi la interŝanĝon de gejunuloj diversnaciaj. Stimuli la junularon de ĉiu lando al la studado de aliaj lingvoj.

El la supre cititaj punktoj sekvas klare ke T.J.O. devus havi lokon en ĉi tiu Federacio, kies celojn kaj proponitajn aktivaĵojn ni jam praktikas. Se ni aniĝos ni rajtos meti antaŭ la Federacion la celojn kaj pretendojn de Esperanto.

N. Rees, Seven Sisters, Kimrujo.

#### **Diversaj organizaj aferoj:**

Ĉi-pere, ni, subskribintoj, deklaras, ke ni post kontrolado de la kaslibroj kaj ĉio cetera, koncernanta la finanĉan flankon de T.J.O., trovis ĉion en la plej bona ordo kaj ke la necesa laboro, farita de S-ro van der Horst, la kasisto de T.J.O., dum la periodo 1945a—1946a certe meritas ĉies laŭdon.

Rotterdamo, la 18an de Septembro 1946a.

A. C. Obbes.  
W. Borsje.

#### **Ce la foriro el la estraro de T.J.O. de S-ino E. van Veenendaal-Bouwes.**

Per kelkaj linioj ŝi konigis al ni sian deziron stari tute libera por ke ŝi povu sin dediĉi al nova tasko sur la vasta tereno de la movado esperanta. Ni bezonis iom da tempo por tute kompreni tion. Tutmonda Junular-Organizo ja estas la kreaĵo de S-ino van Veenendaal, ĝi estas la organizo, kiu ekvivis per ŝiaj amo kaj nelacigebla energio. Dum multe da jaroj S-ino v. V. kvazaŭ mem estis T.J.O., kies membrojn ŝi preskaŭ ĉiujn konis kaj kies geperantoj ĉiuj fariĝis ŝiaj amikoj. Ĉar per korespondado aŭ personaj interparoloj oni tuj spertis, ke ŝi estas homo, aŭ pli bone: homaranino, kiu praktikas la idealojn de la plej bonaj inter la homoj. Kiu ne spertis ŝian gastamon? Kiun el ni ŝi ne kuraĝigis per siaj komprenemaj leteroj kaj alparoloj? Ĉiam ŝi serĉis kaj trovis la bonon en la homfratoj; neniam ŝi atakis aŭ eĉ rebatis. Eltenado estis kaj estas ŝia forto, homamo ŝia gvidilo. Kaj ŝian unuan riproĉan vorton ni verŝajne nun aŭdos, ĉar ni laŭde skribas pri ŝi. Tiel estu. Skribante pri nia amikino van Veenendaal ni devas ĉu laŭdi ĉu mensogi.



Tial ni laŭdas kaj esprimas la elkoran deziron, ke ŝi sukcesu en sia nova entrepreno. Ĝiaj motivoj estas la samaj kiel ĉe la starigo de la esperanta junular-movado: la profunda deziro fari ĉion eblan por plibonigi la mondon kaj por interfratigi la homojn. Inter tiuj homoj estas ankaŭ ni, membroj de T.J.O. kaj ni scias, ke S-ino van Veenendaal ofte estos inter ni en la kunvenoj de la organizo en kiu ŝi havas tiom da amikoj. Konsiderante tion ni konstatas, ke tute ne temas nun pri adiaŭo, sed pri ia „ĝis revido”.

S-ino van Veenendaal, ni deziras al vi sanon kaj forton por ke viaj planoj sukcesu.

La estraro de T.J.O.

**Skribu klare!**

**Resendu tuj!**

**Ad: F. Meydam, Owensstr. 59**

**Leerdam/Nederlando**

**T.J.O.-BALOTILO kaj INFORMILO**

---

Familia Nomo: .....

Personaj nomoj .....

Loĝloko ..... Strato .....

Lando .....

Naskiĝdato ..... Profesio .....

Membro de alia(j) org.(j): .....

Dato de aliĝo al T.J.O.: .....

Skribu sur la punktoj: *jes aŭ ne*:

1. Mi konsentas *pri la aliĝo de T.J.O. al I.E.L.*: .....

2. *Pri la aĝolimo*:

Mi estas por la propono de la belga sekcio: .....

Mi estas por la propono de la estraro: .....

Mi estas por la propono de la franca sekcio: .....

3. *Pri la aliaj ŝanĝoj*:

Subskribo:

**Por la decembraj festoj: Esperanto-Donacoj!**

Mendante ilin ĉe TJO-Centro, vi samtempe subtenas la junular-laboron!

## NIA TUTMONDA FAMILIO.

..... Je la 13-a de julio oni organizis la polularan tendaron de 1946, en Rio de Mouro, en la ĉirkaŭaĵo de Lisboa.

La esperantistoj decidis kunlabori, kaj propagandcele starigis verdan „vilaĝon”. Mi ankaŭ partoprenis kun mia familio.

Sur ĉiuj tendoj flirtis esperantaj flagoj, kaj sur la fono oni povis vidi grandegan afiŝon.

Dum la „tendara fajro” oni propagandis nian lingvon, ĉu prelegante portugallingve, ĉu kantante esperantajn himnojn, ktp.

Dise en la tendeĵo estis videblaj ankoraŭ aliaj esperantaj flagoj, sur la tendoj de samideanoj kiuj preferis reprezenti siajn grupojn. Oni fotografis diversajn aspektojn de nia „vilaĝo”.

Sed ne supozu, ke ĉio estis brila por ni. Jen la alia flanko de la medalo:

En kelkaj revuoj aperis fotoj de nia tendaro kaj de niaj partoprenintoj, sed la literoj de la afiŝo estis nelegeblaj. Kial? Mi ne scias.

La 13-an de aŭgusto '46.

La portugala ĉesperanto.

### RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**Pac-planoj „laŭ la karto”** (t.e. „por elekto”). — 8-paĝa presita libreto, eldonita de Campaign for World Government (Kampanjo por Mond-registaro). En la presaĵo estas traktataj planoj pri porpacaj ŝtataj kuniĝoj, por Monfederacio laŭ demokrata, federacia strukturo. Ne eblas detale recenzi la celojn en „LJV”. Al interesuloj ni konsilas mendi la broŝuron ĉe Campaign for World Government, Room 505, 343 S. Dearborn St. Chicago 4, Ill. Prezo 1 resp. kuponon. Oni volonte donos ĉiajn informojn!

**Elektitaj Fabeloj**, de Fáy András, el la hungara tradukitaj de Maŭro. — Fabeloj por plenaĝuloj, dukolora preso sur bona papero. — 33-paĝa libreto. — Eld. de Szalay, Esperanto-Libroeldonejo en Budapeŝt, Hung. Prezo 0,50 guld.


### Medicina Revuo.

Mi deziras aperigi Esperanto-revuon medicinan por konigi esperantlingve la plej novajn progresojn de la medicinaj sciencoj. Mi petas ĉiujn esperantistojn, kiuj abonas la fondotan revuon kaj emus kunlabori, sciigi min pri tio. Oni aldonu al ĉiuj korespondaĵoj 2 int. respondkuponojn. Adr: D-ro Karlo Mezei, universitata asistanto, Debrecen, Kossuthutca 32, Hungarujo.

#### Atentu!

Je la 15-a de decembro (Zamenhof-tago) okazos Norda Stelo-Kunveno en West-Graafdiĵk! „La Kampfloroj” atendas vin!

NIA FAMILIO VENAS EL HISPANUJO.



„Ĉu vi restis dum la tuta tago en Puerto de la Luz, Pablo? demandas Patrino.

„Ne Panjo! ni iris returne. Ni iris al la banan-ĝardenoj de la patro de Fernando. Li iris al la gardisto kaj revenis kun bananoj, do ni manĝis. Post tio ni iris al Las Palmas kaj Fernando montris kie li loĝas. Ho! li loĝas en bela domo, Panjo! En la mezo estas granda korto kun fontano, palmoj kaj floroj .....”

„Jes! tio estas la patio <sup>1)</sup>”, diras Patrino.

„..... kaj la patrino de Fernando kaj aliaj sinjorinoj sidis sur la patio. Sur la tablo staris bela servo kaj du tortoj.”

„Tortoj!” ripetas Anita. Ŝiaj okuloj brilas.

„Fernando diras, ke liaj gepatroj venas el Aragono. De kie ni venas, Patrino?”

„Patro kaj lia frato — onklo Ignacio — venas el Kastilio: ili estas kastilianoj, sed mi kaj miaj parencoj venas el Andaluzio: ni estas andaluzianoj.”

„Kaj ni, Panjo, ĉu ni estas afrikanoj?”

Patrino ridas. „Ne Pablo! la negroj kaj araboj estas afrikanoj; vi estas eŭropanoj ĉar vi estas hispanoj.”

an

Afrik-o	afrik-an-o;	Azi-o	azi-an-o
Andaluzi-o	andaluzi-an-o;	Eŭrop-o	eŭrop-an-o
Aŭstrali-o	aŭstrali-an-o;	Kastili-o	kastili-an-o

a-e

La viro *aŭdas* malbone

La viro *aŭdas* eksterordinare malbone

La knabo *salutas* ĝentile  
Luiza *kuiras* bone

La knabo *salutas tre* ĝentile  
Luiza *kuiras* eksterordinaire  
bone

La aŭtobuso *veturas* malrapide

La aŭtobuso *veturas tre mal-*  
*rapide.*

la arab-o	la gardist-o	la onkl-in-o	return-e
eksterordinar-a	la kort-o	la parenco	la servic-o
eksterordinar-e	la negr-o	la pati-o	tut-a
la fontan-o	la onkl-o	post tio	tut-e

*Ekzerco.* Enmetu: o-oj; a-aj; e:

Knab. . estas rapid. ., knabin. . estas malrapid... „Anita iras malrapid. .,“ diras Pablo. La arb. . en ni. . garden. . estas eksterordinar. . dik... La gevir. . ripozas sur verd. . benk. . sub alt. . arb... La stel. . brilas hel. . en la mallum. . ĉiel. . Gracia ploris: dik. . larm. . venis el ŝi. . okul... La blank. . kat. . saltis rapid. . de la tabl... La malĝentil. . knab. . kuris al la ruĝ. . aŭtobus... En la korb. . estas divers. . paper. . saket... Restu trankvil. ., Pablo.

Gramatika enhavo: la diftongo: eŭ; la adverbo (ĉe adverbo): e; ripetado: an; is.

<sup>1)</sup> la patio: la plenaera ĉambro de la hispanoj, en kiu ili vivas dum la varma tempo. Ordinare kun floroj, plantoj kaj belaj kaheloj, ofte kun fontano, meblaro eĉ kun bildoj kaj speguloj.

## Leciono 20.

### KIO ATAKIS VIN, PABLO?



El la ĝardeno venas granda tumulto.

„Mi kredas, ke la kato de la najbaro estas en nia ĝardeno,” diras Patrino. „Ĝi estas la speciala malamiko de Mimi.”

Pablo iras al la pordo; li staras sur la sojlo kaj rigardas al la mallumo. Subite li iras returne. „Hu!” li diras, mi atakis besto!”

„Kio estas tio, Pablo!” diras Patrino. Mi vidis, ke vi ne atakis; vi staris nur sur la sojlo!”

„Mi atakis besto. Besto atakis mi!” ripetas Pablo.

„Ho! nun mi komprenas! Vi ne parolas bone!

*Besto atakis viN, Pablo! Kia besto?”*

„Mi kredas, ke ĝi estas birdo.”

— „Verŝajne ĝi estis vesperto; kelkaj

dormas en la stalo. Ĉu ĝi mordis viN?"

„Ne Panjo, la birdo ne mordis mi; ĝia flugilo tuŝis mi!"

„La birdo ne mordis miN; ĝia flugilo tuŝis miN! ripetu, Pablo!"  
Pablo ripetas.

„Aŭskultu bone, Pablo! La viro batas la knaboN. Kiu batas?"

„La viro, Panjo!"

„Bone! La viro batas. KION? La knaboN! Ĉu vi aŭdas la N?"

Jes Panjo!"

Kaj nun: La viroN batas la knabo. Kiu batas?

„La viro, Panjo!"

„Ne! Mi diris: La viroN batas la knabo. Ĉu vi ne aŭdis la N?  
Kiu batas?"

„La knabo batas."

„Jes, la knabo batas. KION aŭ KIUN? la viroN!"

„Aŭskultu bone, Pablo! La hundo mordas la katoN. — La knaboN punas la patro. — Juano turmentas MariaN. La tigroN kaptas la viro."

Ili analizas kaj ekzercas.

---

ili analiz-as	hu!	li pun-as	li turmentas
ĝi atak-is	li kapt-as	special-a	ĝi tuŝ-is
vi aŭd-is	mi kompren-as	vi star-is	verŝajn-e
aŭskult-u	mi kred-as	subit-e	la vespert-o
li bat-as	ĝi mord-is	la tumult-o	mi vid-is
ili ekzerc-as	vi parol-as		

---

Gramatika enhavo: analizi; la rekta komplemento: N (= la komplemento *sen* prepozicio): N post substantivo sing., post la personaj pronomoj mi kaj vi kaj post kiu kaj kio.

Ripetado: is; kia (epetite); e.

## Por komencantoj.

### Nia Sankta Nikolao-festo.

Je la sesa de decembro ni havis feston en „Nia Kastelo". Unue ni kantis. Kaj tiam subite envenis Sankta Nikolao kun Nigra Petro. Al Arie Velthuis li diris: „Vi devas pli bone lerni vian Esperantolecionon." Devis ankoraŭ veni al li knaboj kaj knabinoj. Ili devis kanti. Ni ricevis ĉokolado-lakton kaj kuketojn. La barbo de Sankta Nikolao fariĝis bruna, kaj la nazo de Nigra Petro fariĝis ruĝa. Petro iris al Henk Leegwater kaj diris; „Kio estas via nomo?" Tiam diris Henk: „Mi estas via frato". Tiam ni ĉiuj ridis. Subite oni frapis sur la pordo. Ni iris rigardi, kaj ni pensis, ke estas virino. Sed estis granda pupo. Sur ĝi estis letero. En la letero staris, ke sur la pupo estas donacoj por „Nia Kastelo".

Ni rajtis elpaki ilin. Estis lampo, paperujo, kukujo, tri kalendaroj, 2 koboldoj, bombonujo, 2 libroj, kvartetludo, ktp. Tiam ni iris hejmen, kaj ni certe ne forgesos la feston!

O. Graftdijk.

Annie Jonker (11-jara).

#### *Noto de la red:*

En multaj lokoj en Nederlando oni je la kvina de decembro kutimas festi la naskiĝtagon de „Sankta Nikolao”. Junaj infanoj kredas, ke li estas hispana episkopo, kiu kun siaj nigraj servistoj venas al Nederlando, por doni donacojn al obeemaj infanoj. Vespere li sur blanka ĉevalo rajdas sur la tegmentoj, kaj la nigraj „Petroj” aŭskultas ĉe la kamentuboj, ĉu la infanoj bone kondutas. Nokte ili metas la donacojn en la korbojn, kiujn la infanoj metis ĉe la forno. Estas kutimo, ke la pli aĝuloj, kiuj ne plu „kredas” tamen interŝanĝas donacojn je tiu dato. Generale estas tre amuzaj, hejmecaj festoj. La antaŭan jaron ankaŭ la Esperanto-junulargrupo „La Kampfloroj” en West-Graftdijk organizis tian feston por siaj anoj en la klubejo. Du el la pli aĝaj anoj prezentis la sanktulon kaj Nigran Petron. Ĉar la festo ne estas imagebla sen donacoj, ĉiu ano faris ion por la klubejo.

#### **Ne tio.**

Viro havis vundon je la kapo. Amiko renkontis lin, kaj demandis: „Diru, Johano, ĉu vi vundis vin je la kapo?”

„Ne!” respondis la viro. „Mi vundis min je la piedo, sed la bandaĝo iom ŝoviĝis!”

#### **La kuracilo.**

Viro estis nerve malsana. Li ĉiam sonĝis, ke sub lia lito estas besto, kiu volas mordi lin. Li vizitis jam multajn kuracistojn, sed neniu povis helpi lin. Tamen — fine li trovis kuracilon.

Li vizitis ĉarlatanon, kaj ĉi tiu konsilis al li — forhaki la piedojn de la lito. De tiam la viro dormis kviete, ĉar ja nenio povis veni sub lian liton!

#### **En la tramo.**

Apud tre eleganta sinjorino sidas ne tro pura stratbubeto. La knabo malvarmumis, kaj lia nazo estas tre malpura. Li ronke flaras. Fine la sinjorino diras: „Ĉu vi ne havas naztukon?”

„Ho jes! Sed mi ne pruntedonas ĝin!”

### La puno.

„Sinjorino, via hundaĉo mordis pecon el mia pantalono, kaj tute detruis ĝin!”

„Fi Tido! Maltaŭgulo! Nun mi punos vin! Dum la tuta semajno vi ne rajtos porti vian ruĝan rubandeton!”

### Orienta juĝo.

Laboristo grimpis sur tegmenton por ripari kamentubon. Li tamen falis malsupren. Sur la trotuaro ĝuste promenis sinjoro, kaj la laboristo falis sur lin. Pro la skuo la sinjoro tuj mortis. La filo de la mortinto plendis ĉe juĝisto, kaj postulis, ke li punu la laboriston. La juĝisto opiniis, ke la laboristo estas senkulpa. Tamen la filo ne estis kontenta. Li diris: „La viro meritas punon! Li mortigis mian patron, ĉar li estas la kaŭzo, ke mia patro ne plu vivas!”

La juĝisto pripensis momenton kaj respondis: „Nu, mi permesas, ke vi punu lin. Mi ordonos, ke li staru sur la sama loko, kie iris via patro. Vi grimpu sur la tegmenton, kaj faligu vin sur lin! Tiel vi povos klopodi mortigi lin.”

La filo levis la ŝultrojn kaj — foriris.

*Respondu al jenaj demandoj:* Kiu grimpis sur la tegmenton? Kion li faris tie? Kie estis la kamentubo? Kio okazis? Kiu promenis sur la trotuaro? Ĉu la laboristo falis sur la straton? Ĉu la sinjoro vundis sin? Ĉu la mortinto havis filon? Kien iris la filo? Kion opiniis la juĝisto? Ĉu la filo akceptis tion? Kion li postulis? Ĉu la laboristo estis vere kulpa? Kion la juĝisto fine konsilis? Ĉu la filo sekvis la konsilon de la juĝisto? Kion li faris?

### Kion ili volus lerni.

Du novaj gastoj alvenis en la punejon.

La direktoro akceptas ilin kaj diras: „Tie ĉi vi povas lerni kiun ajn metion, se vi bone kondutas. Kion vi preferus lerni?”

„Mi volus konduki la ŝafojn en la herbejon!” diras unu.

„Mi preferus fariĝi ŝipisto en la komerca ŝiparo,” respondas la alia.

### Li sciis.

Patro diris al sia fileto: „Vi estas azenido! Ĉu vi scias, kio estas azenido?”

Knabeto: „Jes patro! Azenido estas ido de azeno!”

## KORESPONDADRESOJ.

**Britujo:** Bona propagando! Sendu antaŭ la 16a de decembro salutleterojn al s-ro A. Dean, Bolton Commercial Academy, 1 Wood St. Bolton, okaze de speciala tago por gepatroj kaj vizitantoj.

**Ĉeĥoslovakujo:** 19-jara studento Miroslav Veverka, Cerhenice u Kolina, dez. kor. k. interŝ. poŝtm., kun geamikoj en la tuta mondo.

**Nederlando:** S-ino de Bruyne-Blesing en Oosthuizen (NH) deziras korespondi kun ĉiuj landoj.

F-ino Ada v. d. Sleen, instruistino, Nieuwlande 8, bij Hoogeveen, deziras korespondi pri seriozaj temoj.

Bertus de Leeuw, 28-jara, Piet Heinstr. 62, den Helder, dez. kor. kun eksterlandaj geamikoj pri ĉiuj temoj. Respondo certa.

**Svedujo:** Ruben Enocson, c/o Rönström, Valhallavägen 22<sup>III</sup>, Stockholm, 22-jara aertrafika oficisto, deziras \*kor. kun geamikoj.

**Al Naturamikoj.** En 1941 fondiĝis la „Griza Strigo” (tiel nomita laŭ Indiano „Griza Strigo”, kiu forte malamis kruelecon kaj detruon de naturaj belaĵoj, kaj bataladis por la konservado de sovaĝaj bestoj; li mortis en 1938). Esence ĝi estas junular-organizo, kvankam inter ĝiaj anoj ankaŭ troviĝas maljunuloj, kiuj spirite restas junaj. Ĝia celo estas fondi tutmondan kunigilon por unuigi ĉiujn, kiuj amas la naturon kaj ĉiujn vivantajn kreitaĵojn. Ĝia oficiala (angla-esperanta) organo estas „La Verda Folio”. La redaktoro petas ĉiujn naturamikojn sendi artikoletojn pri propraj spertoj en la naturo. Li serĉas perantojn en ĉiuj landoj. Red. adreso: D. F. Faux, The Bungalow, New Drive, Painswick, Glos, Anglujo.

**Stepa Domo** <sup>1)</sup> (10-18 aŭg. '46). Malgraŭ la pluva veteraĉo dudeko da gesamideanoj vizitis Stepan Domon (en St. Jean de la Neuville, Francujo) dum la esperantista semajno. La pli multo el ili estis „joganoj” <sup>2)</sup>. Post la renkontiĝo nia kamarado Alex Chazal biciklis al Nantes, kie li en la kongreso de la franca junulgasteja movado (MLAJ) voĉdonigis pri propono favora al Esperanto.

Venontjare jogana esperantista semajno estos aranĝata verŝajne tuj post la kongreso de Bern kaj en la sama regiono.

Paul Mary.

<sup>1)</sup> Stepa Domo estas junulargastejo en St. Jean de la Neuville apud Bolbec, proksime de le Havre.

<sup>2)</sup> Jogano estas mallongigo de Junular-Gastej-Ano.

### ARGENTINA ESPERANTISTO

16-paĝa, ilustrita revuo, presita sur bonkvalita papero. Aperas 8-foje jaro. Jarabono 1 usona dolaro (f 2,50). Mendebla ĉe TJO-Centro. Specimenoj estas haveblaj kontraŭ f 0,35.

### DECEMBRA OFERTO!

Ĝis januaro TJO-Centro liveras al vi aŭfrankite jenan korespondpake-ton:  
15 leterfoliojn, 15 kovertojn 100 glumarkojn, unu ilustritan poŝtkarton por ... **unu guldeno!**